# <u>Ne estu koko, venu al KKPS!</u>

Ĉu vi rajtas nomi vin Esperantisto, se vi neniam ĉeestis la Klaĉ-Kunvenon Post-Someran? Evitu tiun filozofian demandon per tuj aliĝi al la mojosa aŭtuna kunveno




de la Nederlanda Esperanto-Junularo. KKPS en 2018 okazos de la 2-a ĝis la 4-a de novembro en Bekerhof en Hunsel, preskaŭ ĉe la belga landlimo kaj bone atingebla per publika transporto. La programo konsistos el halovena balo, koncerto, ekskurso, kursoj kaj prelegoj. La grupdomo havas luksajn sofojn, trinkejon, sportkampojn kaj fajroplacon. La vilaĝo Hunsel havas neniun interesaĵon.


Aliĝu per kkps.esperanto-jongeren.nl. Sed hastu por ne maltrafi la unuan aliĝperiodon ĝis la 11-a de aŭgusto!

## Jen la kotizoj:

| | Benelukso | Okc. Eŭropo | Resto |
|---|---|---|---|
| 35+ | €70 | €65 | €60 |
| 20-34 | €55 | €50 | €45 |
| 4-19 | €45 | €40 | €35 |
| 3- | | €10 | |

**Membroj de TEJO aŭ NEJ** pagas €10 malpli, aliĝoj post IJK pagos €5 pli.

**Minimuma antaŭpaĝo**: €15. Malmultekostaj trajngrupbiletoj haveblas.



# Pos-Amiko

**Somero 2018, Numero 25**

*Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!*

## INDEKSO:

1. Ni havas Pepon!
1. UEA ŝparas pri vojaĝkostoj

2. Kelmis petas eliron el Eŭropa Unio
2. Retumantaj NEJ-anoj retumu
2. TEJO vigle renovigas estraron

3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo

4. EVENTOJ

## KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.
Redaktoro: Koko Poso
kkps.klackunveno@gmail.com
http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko

## Ni havas Pepon!

Antaŭ du monatoj al la mondo prezentiĝis la nova Pepo. Li salutis la urbon kaj la mondon antaŭ placo plena je homoj en Strasburgo. Post kiam la malnova Pepo surprize anoncis sian demision pro aĝo, rapide kunvokiĝis kunveno por elekti novan simbolon de TEJO. La elektita Pepo laŭ spertuloj sekvos la saman politikon kiel sia antaŭulo.

## UEA ŝparas pri vojaĝkostoj

La nova Ĝenerala Direktoro de la Universala Esperanto-Asocio Martin Schäffer proponis novan manieron por provi balancigi la buĝeton de UEA: la oficistoj kaj volontuloj de UEA, kiuj bezonas ĉeesti la Universalan Kongreson en Lisbono, ne ricevos vojaĝbileton. Anstataŭe ili ricevos grandan pecon de kartono, dikskribilon kaj aŭtoŝosean mapon de okcidenta Eŭropo. Duope la CO-anoj ofertu Esperanto-kursojn al aŭtoŝoforoj, kiuj veturas en la ĝusta direkto. Por reveno sama sistemo estas planita.
Oficistoj tamen rimarkas kun zorgo, ke en iu sekvontjara buĝeto ankaŭ malaperis mono por flugbiletoj al Montrealo. Ne iras multaj aŭtoŝoforoj inter Roterdamo kaj Montrealo, do simila strategio ne povus funkcii en 2020. Schäffer al la plendoj nur respondis, ke oni “ne zorgu, sed kolektu ĉiujn haveblajn plastajn botelojn”.

## Kelmis petas eliron el Eŭropa Unio

La komunumo de Kelmis (en la germanlingva parto de Belgujo) hieraŭ skribis al la britelira negocteamo de la EU kun peto aldoniĝi al la negocoj por eliri la landunion. La Eŭropa Komisiono provizore respondis, ke por eliri la Eŭropan Union Kelmis unue eliru la germanlingvan komunumon, la valonan regionon kaj la belgan federacion. Laŭ la urbestro de Kelmis tio tamen estos sekvinda paŝaro:

“Kiel parto de la EU ni ne mem regas nian enmigran politikon nek niajn landlimojn. Ekzemple se 200 junuloj el multaj landoj volus veni ĉi tien por organizi rokfestivalon, ni ne povas malpermesi ilian eniron. Ni ja devas protekti niajn infanonojn de strangaj sektoj.”

## Retumantaj NEJ-anoj retumu

Dum pasintaj NEJ-tagoj ofte okazis, ke ĉeestantoj rigardadis sian poŝtelefonon aŭ eĉ kunportitan komputilon anstataŭ atenti pri la taga programo. Pro tio dum la julia NEJ-tago la estraro decidis ŝanĝi la programon tiel, ke rigardi poŝtelefonon aŭ ekranon estos la oficiala programo. Tiel neniu povus malsekvi la programon.

Uzante la saman logikon, la IJK-organizantoj planas okazigi ĉiujn programerojn en la naĝejo, por ke neniu foriru por naĝi.

## TEJO vigle renovigas estraron

Antaŭ unu jaro, dum la IJK en Togolando, TEJO enkondukis ŝanĝon de sia regularo, por elekti estraranojn ĉiujare anstataŭ ĉiudujare. Tiu ŝanĝo kongruigu la estraranecon pli bone kun la ŝanĝiĝema vivo de junuloj, kiuj ne ĉiam povas bone plani du jarojn antaŭe. Tamen ĉi-vintre evidentiĝis, ke ankaŭ tio ne sufiĉas por eviti subitajn eksiĝojn el la TEJO-estraro. En januaro kaj februaro Enric Baltasar kaj Doniben Jimenez Jaramillo demisiis, tiel kreante mankon en la estraro por kelkaj monatoj.

Pro tio, laŭ fidindaj fontoj, la TEJO-estraro nun planas prezenti dum la IJK en Badajoz regulŝanĝon, ke estraranoj reelektiĝu ĉiumonate. Krom pli bona plenumado de la postenoj, tio ofertas kelkajn pliajn avantaĝojn: pliaj homoj povos aldoni estraranecon al sia vivresumo, estraraneco povas esti ligita al portempa projekto, kaj eblas ŝpari pri vojaĝkostoj per havi malgrandan estraron dum estrarkunsidoj. La nura malprofitanto estas la Elekta Komisiono, kiu nun senĉese devos labori.

# NEJ-Novaĵoj!

## Iĝu estrarano de Nederlanda Esperanto-Junularo!

Je la sabato de KKPS, la 3-a de novembro, okazos la ĉiujara membrokunveno de NEJ. Tio estas via ŝanco por akiri senmortan famon per iĝi estrarano. Kandidatiĝu nun per sendi retmesaĝon al esperantojongeren@gmail.com. La nura kondiĉo por kandidatiĝo estas membreco en NEJ.

## LA HOROSKOPO

**Ŝafo:** Vi malatentas vian komputilan ekranon pro via poŝtelefona ekrano.

**Taŭro:** Vi kandidatiĝos por esti TEJO-estrarano dum malparaj monatoj.

**Ĝemeloj:** Via patrino malpermesos organizi rokfestivalon en ŝia ĝardeno.

**Kankro:** Vi renkontos ĉarman formikon.

**Leono:** Vi forgesis aĉeti donacon por la nas-kiĝtago de Esperanto.

**Virgulino:** Post buskaravano vi ne plu estos.

**Pesilo:** Vi ankoraŭ petveturas kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Skorpio:** Duolingo por vi ne sufiĉas: vi starigas Triolingon.

**Kévin M.:** Tiu ĉi horoskopo estas postmoder-na.

**Sagitario:** Vi malkovras, ke pli agrablas suno ol luno.

**Kaprikorno:** Atentu ne vundiĝi per la paper-rando.

**Akvisto:** Vi aliĝos al KKPS por pli frue ricevi la Pos-Amikon.

**Fiŝoj:** Paku bonan sveteron por la vojaĝo al la ibera duoninsulo!

## Naskiĝo de EKU

En Utrecht komenciĝis serio de renkontiĝoj por parolantoj kaj lernantoj de Esperanto, afiŝataj per la lernoretpaĝo Duolingo. Dum la unua tia kunsido, je ĵaŭdo la 24-a de majo, ĉeestis dek homoj kaj kreiĝis la Esperanto-Klubo Utrecht. La simbolo de la klubo estas bovino (e-koe).

## NEJ aliĝas al NJR

Nederlanda Esperanto-Junularo komencis la procedon por iĝi membra asocio de la nederlanda junulara konsilio NJR (Nationale Jeugdraad). Pliaj informoj sekvos.

## Lingvofestivalo en Leeuwarden

De la 25-a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro en Leeuwarden estos semajno pri Esperanto en la eŭropa kultura ĉefurbo. Je sabato la 1-a de septembro tie estos NEJ-tago.